

LA LONGA VOJO de RICHARD MEYE
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-001-B-1, 1990.12.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- En esperantujo baldaŭ estos la tago de la libroj. Kiel ĉiuj scias, la 15-an de decembro multaj esperantistoj festas ne nur memorante la naskiĝdaton de Zamenhof, sed ankaŭ mendante libron. Per tiu aĉeto de libro ili apogas la esperanto-eldonejojn. Kiun titolon vi proponas por tiu ĉi jaro?

Cl.- Mi konsilas la originalan romanon de Richard MEYE: **La Longa Vojo**, kiun ĵus reeldonis la entrepreno **Pro Esperanto** en Vieno.

A.- Kial tiu romano, kaj ne alia?

Cl.- Eble pro tre persona kaŭzo. Mi eklernis la lingvon internacian per atenta tralego de tiu rakonto pri du vagabondoj kaj pri ties neordinara amikeco ĝismorta. Kaj releginte plurfoje tiun verkon mi konvinkiĝis, ke ĝi estas libro inda je atento pro pluraj kaŭzoj. Lingve ĝi estas interesa. La vorto kurilaĉoj, kiun mi ekzemple trovis jam sur la kvara linio komprenigis al mi kapablon de esperanto mem forĝi vortojn tre elvokivajn. Stile ĝi estas agrabla. Tre facile ĝi legiĝas, lasante viglajn frazstrukturojn en nia memoro. En tiu unua paĝo frapis min la diro: Jen ili sidas: forto apud malforto, belo apud malbelo. Kaj enhance ĝi kaptas nin. Kun la du almozuloj ni komencas malkovri mondon al ni absolute fremdan. Kaj plurfoje, promene, mi repensis al tiuj du malsamaj homoj, kiun la senlaboreco kondamnis al eterna migrado almozpeta de vilaĝo al vilaĝo. Ili vidigis al mi alimaniere la naturon kaj la socion. Mi havis grandan privilegion eklerni la lingvon pere de la trastudo de neordinara verko. Kaj plurfoje mi konsilis tiun ĉi romanon al esperanto-lernantoj, ĉu komencantoj, ĉu progresantoj. Ĉiuj tralegis la verkon de Richard MEYE kun intereso. Tial mi konsilas tiun ĉi libron denove aĉeteblan, esperante samtempe kuraĝigi Herbert MAYER, kiu estras la eldonejon Pro Esperanto. Mi scias, ke li ne lasos la titolon ree elĉerpiĝi, kaj vigla aĉetado de La longa vojo instigos lin reeldoni aliajn samnivelajn elĉerpitaĵojn, kiuj devus troviĝi en ĉiu privata esperanto-libraro.

A.- Ĉu ni prezentu la libron per laŭtleĝo de fragmento?

Cl.- Tre bona ideo. Kaj kial ne per la laŭtleĝo de la unua paĝo, kiun mi jam aludis?

A.- Jes. Kaj por doni ideon pri la aspekto mem de la stilo, ni ŝanĝu la voĉon post ĉiu paragrafo.

Cl.- "Damne. Ĉu tiu vojaĉo neniam finiĝos? Jam kvin horojn ni marŝadas, sed dometon eĉ ne vidis."

A.- Kaj, post paŭzeto:

Cl.- "Malsato min mordas, la gorĝo brulas, kaj la kurilaĉoj rifuzas la servon. Finon !"

A.- La voĉo silentiĝis: ĝia posedanto sidiĝis en fosaĵon kaj ĝeme etendis la krurojn.

Cl.- "Se vi opinias," daŭrigis la voĉo, "ke mi antaŭ du horoj leviĝos, vi eraras."

A.- "Tion mi ja ne atendas," respondis la kunulo, sekvis la ekzemplon de la unua kaj sidiĝis apud lin.

Cl.- Post tio ambaŭ silentiĝis.

A.- Ili estis sufiĉe malsimilaj unu al la alia.

Cl.- La unua: granda bonkreska junulo. Bukla hararo kovras la kapon, kaj brave aspektas la sunbruniĝinta vizaĝo.

A.- La alia: ankaŭ li - juna viro, kvankam pli aĝa ol la unua, sed malaltkreska. Malforta li aspektas, kaj lace-malgaje rigardas la okuloj en la mondon.

Cl.- Jen ili sidas: forto apud malforto, belo apud malbelo.

A.- Stranga kontrasto! Tute malsamaj homoj.

Cl.- Jen tiu unua paĝo de la romano **La longa vojo**. Ni memorigas, ke tiun originalaĵon eldonis Heroldo de Esperanto en Köln en 1935, do ĵus antaŭ la persekuto kontraŭ la esperantistojn fare de la nazia reĝimo, kaj se mi estas bone informita, la aŭtoro Richard MEYE estis unu el la viktimoj de tiuj kondamnoj al deportado. En 1954, kiam mi rakontis al germanoj, ke mi lernis la lingvon legante la romanon **La longa vojo**, unu el la plej maljunaj ĉeestantoj rakontis, ke li plurfoje renkontis Richard MEYE iom antaŭ la jaroj tridekaj okaze de esperanto-renkontiĝoj en Köln, kaj ke poste li aŭdis, ke fariĝinte senlaborulo, MEYE iĝis vagabondo. Tio signifus, ke **La longa vojo**, la unusola verko de Richard MEYE, havas aŭtobiografian karakteron. Tion mi volonte kredas, ĉar ĝi neniel ribelas kontraŭ la almozula sorto, kontraŭ la socio. Ĝi ne havas kritikan sintenon. Ĝi nur priskribas situaciojn kaj faktojn. Tiurilate ĝi estas vivatestaĵo pri tempo nun forpasinta. La moderna mondo havas siajn vagabondojn, sed ili ne plu estas de la sama tipo, kaj ili ne plu frekventas la samajn lokojn.

A.- Ĉu Herbert MAYER en la postparolo al la libro alportas sciigojn pri la aŭtoro kaj pri la verko?

Cl.- Jen vi legu, kion li diras pri la aŭtoro:

A.- "Malĝojiga fakto: pri la vivo de Richard MEYE oni scias preskaŭ nenion. Sinjorino JUNG, la vidvino de la unua eldoninto de ĉi romano (1935), nur memoras, ke MEYE aktivis en la tridekaj jaroj por iu Esperanto-klubo proksime de Köln (Germanio). Jen ĉio! Eble pli longa serĉlaboro povos elfosi ankoraŭ kelkajn faktojn. Sed por la nuna momento nenion alian mi povas prezenti. Restas nur la verko, eta romano kun temo iom nekutima: la vivo de vagabondoj sur la longa vojo.

Cl.- Kaj pri la verko mem Herbert MAYER donas recenzajn sciigojn, kiujn vi citu:

A.- "Malgraŭ konekso kun konkreta historia situacio, la romano ne estas socia romano. Fakte la aŭtoro limigas sin al intima pentro de la aventuroj de du migruloj, Petro kaj Mikaelo, kaj de

ilia amikeco, kiu daŭras ĝis morto. Sed li tute ne tuŝas la respondecon de la socio, kies ununura kulpo laŭŝajne estas nekompreneo kaj malestimo de vagabonda vivo.

Cl.- Herbert MAYER ankoraŭ prave skribas:

A.- La verko meritas reeldonon, ĉefe pro sia rakonta kohereco, kiu mildigas iom la kelkajn sentimentalajn kaj naivajn trajtojn. Same rimarkinda estas la lingvaĵo, kiu per sia klasika simpleco tut-verŝajne respegulas la parolatan Esperanton de la tiama periodo. (fino de citaĵo)

Cl.- Mi esperas do, ke multaj el niaj aŭskultantoj ne travivos la zamenhofan tagon 15-an de decembro sen mendi la romanon **La longa vojo**, 138-paĝa libro belaspekta, reeldonita ĉijare de **Pro Esperanto**, Vieno, en la serio Originala Literaturo Klasika. En Svislando ĝi estas perkoresponde aĉetebla en la libro-servo de Kultura Centro Esperantista kontraŭ SF 17.90 plus sendokostoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND diras al vi, ĝis reaŭdo!